# TEJO-aktuale: numero 458, 2019-04

**n°458 | Aprilo 2019**

Delegacio de sep esperantistoj reprezentis TEJO-n dum la Junulara Forumo **ECOSOC** de la **Unuiĝintaj Nacioj** en Novjorko.

Jen la nova numero de Revuo Kontakto – la ĉeftemo de la numero estas **Menstruo-Tabuo. Kiam ĉesos la kondamno?**

En **Movada Rubriko** vi trovos intervjuon al Querino Neto pri BEJO, artikolon de Marcionilo Vasconcelos kaj artikolon de Carlos Pesquera Alonso pri IJK.

**TEJO** partoprenis la konsilion de membroj de **FoJE – Forumo Junulara Eŭropa *(European Youth Forum)*** de la 12-a ĝis la 13-a de aprilo en Bruselo.
Rogier 'Roĉjo' Huurman kaj Paulína Jalakšova reprezentis nian organizon.

Ĉu vi deziras pruvi per oficiala ŝtata diplomo vian **lingvoscion pri Esperanto**? Ĉu entute vi scias kiunivele vi konas nian lingvon?

**Vi povas ekzameniĝi laŭ la KER-sistemo dum IJK en Slovakio!**

Iĝu TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo (2019-2020)!
Kadre de la **Eŭropa Volontula Servo**, TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) invitas vin por iĝi plentempa **TEJO-volontulo** en la **Centra Oficejo en Roterdamo**.

# Venontaj eventoj

De la **7-a ĝis 10-a de junio 2019** la KEKSO okazos kune kun la Germana Esperanto-

Kongreso (GEK) en **Neumünster**.
Ni antaŭĝojas vian ĉeeston!

**Por pli da informoj, alklaku la bildon!**

---

La 54-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj la 39-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso okazos de la **20-a ĝis la 23-a de junio 2019**, en la urbo **Gojanjo**, ĉefurbo de la subŝtato Gojaso, Brazilo.

**Por pli da informoj, alklaku la bildon!**

---

Ekkonu la teamon de IJK 2019 en Slovakio!

---

**Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO Aktuale?**
Sendu viajn novaĵojn al **tejoaktuale@tejo.org** antaŭ la 23-a tago de la monato
Antaŭdankon pro la helpo!

---

## K o l o f o n o

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Clément Baleyte
**Kontribuanto de ĉi tiu numero:** Ariel Palmer

**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) • tejo.org

*Kopirajto © 2019 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno

This email was sent to capiscuas@gmail.com
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands